The solitary student may well congratulate himself on the fact that there hardly exists in Esperanto the necessity of training the ear, which plays so important a part in the acquisition of every national language. Even if a foreigner should be the first person with whom you may have occasion to speak, you will be surprised at the ease with which your ear will recognize the harmonious sounds of Esperanto. What is more, even if the words are uttered in a slovenly manner, the many characteristic speech-groups, in which our language is so rich, will engage the ear and often enable you to guess the remainder of a sentence. This fact, in regard to which we need not enter here into any theoretical discussion, is the best answer to those "scientific" opponents of Esperanto who have recently indulged in divers pitifully dilettant criticisms on the impossibility of Esperantists making themselves mutually understood. Boulogne, Geneva and Cambridge have proven to the world at large, what has been the personal experience of many thousands who have used our tongue, that it is much more than a dumb code, as some would have it; that it is a well-tuned instrument, capable of the richest modulations, and that there is a surprisingly large number of those who can play this instrument and (to use the words of our master) "clearly understand each other's meaning."

ninta, ekverku leteron de almenaŭ du cent vortoj pri sufiĉe konata al vi temo. Se vi dum ĉi tiu laboro ne povas sen helpo de angla-esperanta vortaro trovi turnojn, kiuj proksimume esprimas viajn ideojn, estu konvinkita, ke, anstataŭ daŭrigi liberajn skribajn ekzercojn, vi faros bone, se vi fordonos pli da tempo al plua legado, parkera lernado kaj buŝa reproduktado. Eĉ gramatikan korektecon, ĝis certa grado, vi povas lerni pli sukcese el leglibro, ol el gramatiko aŭ vortaro. Resume: unue legi, due paroli, trie skribi; sed kiel kompreni, se oni ne havas okazon aŭdi la lingvon parolata?

La sin mem instruanto ja povas ĝoji, ĉar apenaŭ ekzistas en Esperanto la neceseco, tiel grava en ĉiuj naciaj lingvoj, kutimigi la oreilon. Eĉ se fremdlingvano estos la unua persono, kun kiu vi havos okazon paroli, vi estos surprizata, kiel facile via orelo distingos la harmoniajn sonojn de Esperanto. Plie, eĉ se la vortoj estos malzorge elparolataj, la multaj karakterizaj songrupoj, je kiuj estas tiel riĉa nia lingvo, ofte kaptos la oreilon kaj igos vin kapabla diveni la restaĵojn de propozicio. Ĉi tiu fakto, kiu ne postulas pluan komentarion, estas la plej bona kontraŭrespondo al la diversaj esperant-atake-maj scienculoj, kiuj antaŭ ne longe kritikaĉis kun kompatinda dilettanteco la imagatan neblecon por Esperantistoj kompreniĝi reciproke. Bulonjo, Genevo kaj Kembrigo pruvis al la tutmondo tion, kio estis antaŭe la persona sperto de multaj miloj da samideanoj; ke nia lingvo estas multe pli ol muta ciferaro, kiel kelkaj pretendas; ke ĝi estas bone agordita instrumentego, kapabla je la plej riĉaj moduladoj, kaj ke grandega jam estas la nombro de tiuj, kiuj povas ludi sur ĉi tiu instrumento, "unu komprenante la alian."

Otto Haux Mayer (Chicago).

NOTICE TO ALL MEMBERS OF THE ASSOCIATION

This is your last chance to send in nominations for the 1908 Council. *Send them to-day.* Consult the July and September numbers of the Journal.

All members who hold "Atestoj pri Kapableco" from either the French or the British Associations are asked to send us their names immediately.

ANSWERS TO CORRESPONDENTS

Now. When "now" means "at this time" it is properly translated by "*nun*"; for example "I am busy now with many things" is "mi *nun* estos okupata de multaj aferoj." "Now this is so" might be translated "*Nu* tio estas tia"; "*nu*" is inferential, or may have no stronger meaning than the word "well" in such English phrases as, "Well, it is a good day." "Now" may also be translated by "*jam*"; for example, "Mi *jam* finis mian laboron," "I have now finished my work."

Already. "*Jam*" alone may sometimes be used to translate the English word "already." See the last sentence in the last paragraph. However, if one wishes to bring out strongly the meaning of "already," one must add the words "*nun*," "*antaŭe*," etc. "I had already arrived" = "Mi *jam antaŭe* alvenis."

Therefore, then. "Therefore" is "*tial*"; "then" (at that time), "*tiam*." But a weak "therefore," an inferential "then," is "*do*." "Mi *do* devas konfesi tion" = "I must *then* admit this."

Jam. En la angla ne ekzistas vorto, kiu ĝuste tradukas la esperantan vorton "*jam*." La ŝlosilo troviĝas en la ideo, ke "*jam*" montras, ke ŝanĝo estas okazinta—ke la nuna stato, aŭ la preparolata stato de aferoj, malsimilas antaŭan staton. Prenu ekzemple la jenan frazon: "*Mi ne povas jam saluti vin, kiel mi faris tiom multe da fojoj,—mi salutas malĝoje vian cindron, kara, neforgesebla amiko!*" (Dro. Zamenhof, en *La Revuo*, p. 291.) La vorto "*jam*" tie ĉi atentigas, ke antaŭe li povis saluti ĝoje, sed ŝanĝo estas okazinta kaj nun li *jam* ne povas saluti ĝoje.

Estas utile kompari la vorton "*jam*" kun "*ankoraŭ*," ĉar kiel "*jam*" montras, ke ŝanĝo estas okazinta, tiel "*ankoraŭ*" montras, ke ŝanĝo *ne* estas okazinta. . . . "*Mi rememoras kortuŝite pri la unuaj pioniroj, kiuj laboris por nia afero en tiu malĝoja tempo, kiam ni ĉie renkontadis ankoraŭ nur mokon kaj persekuton.* (Ŝanĝo ne estis okazinta.) *Multaj el ili vivas ankoraŭ (ŝanĝo ne estas okazinta). . . . Sed, ho ve, multaj el niaj pioniroj jam ne vivas.*" (Dro. Zamenhof en Boulogne.)

El Brita Esperantisto.

ADVICE TO STUDENTS

Esperanto is beginning to be popular. New text-books are appearing; "correspondence courses" in Esperanto are being established.

We welcome these signs of interest in our "afero," but we wish to put our readers upon their guard in respect to many of them. Do not be led astray by such specious advertisements as the following: "Esperanto taught by the method especially authorized by Dr. Zamenhof," etc. Any one can teach himself by this method without the help of any teacher. It is all in Bullen's Lessons; price, 26 cents.

However, a *good teacher* may be of use in the study of Esperanto as well as in that of other languages. What, then, is a good teacher? The mere ability to manufacture a so-called text-book amounts to nothing. We have had a surfeit of such books, and none of them is as good as the old Ekzercaro with Bullen's Notes. Nor is cleverness in advertising a necessary qualification for teaching.

A good Esperanto teacher, generally speaking, should have the following qualifications:

1. He should possess the *Atesto pri Kapableco* of the French, British, or American Esperanto Associations.
2. He should be a *professional teacher*, preferably one of languages, and one acquainted with modern methods of instruction.
3. He should have met other Esperantists, and have *conversed with them, and written to them*. If he has attended any of the World Congresses, so much the better.
4. He should be able to show his mastery of Esperanto *in the works he has translated or in articles* which he has written for Esperanto journals.

We should advise students of Esperanto to insist upon such qualifications in their teachers, that is, of course, where instruction is paid for. You can get sound instruction from competent teachers in Boston, Chicago and Philadelphia, and doubtless elsewhere. Therefore do not throw your money away foolishly.

TRI "ANAKREONTEA" EL LA GREKA ESPERANTIGITAJ

Prof. Ivy Kellerman, Iowa State College, Grinnell, Ia.

43.

We do bless thee, O Cicada,
 When upon the lofty treetops
 After taking sips of dewdrops
 Like a king thou singest there;
 For now all this is thine own here,
 Whatsoever lives in meadows,
 Whatsoever forests nurture.
 Thou art comrade of the farmers,
 And by nothing art thou harmed;
 Thou art honored by the mortals,
 Sweetvoiced prophet of the summer;
 And the Muses love thee dearly,
 Loves thee Phoebus' self as well,
 And melodious song he gave thee.
 Never yet shall age consume thee,
 (Thou art wise,) and song thou lovest,
 Of the Earth wast thou created,
 Not a woe hast thou, thy body
 Is of flesh that's truly bloodless,
 Thou art like unto the gods.

19.

The dark earth drinks,
 The trees drink up the Earth,
 The sea it drinks the streams,
 The sun then drinks the sea,
 And e'en the moon the sun,
 Why will ye then, O comrades,
 Thus idly strive to hinder
 When I too fain would drink?

59.

I found when twining garlands
 That love was 'mong the roses;
 Then by his wings I seized him
 And in the wine I dipped him;
 And then the wine I drank,
 And now within my body
 Are softly ever fluttering
 The little wings of Love.

43.

Ni vin benas, kar' Insekto,
 Kiam sur la arbosuproj
 Da la ros' iom trinkinte
 Kvazaŭ reĝo vi kantetas;
 Via propra estas ĉio
 Kio en la kampo floras,
 Kion nutras arboregoj,
 Kamarado de farmastroj,
 Vin nenio ajn malhelpas;
 Honorata de mortontaj,
 Pri somero dolĉeprofeto;
 Vere amas vin la Muzoj,
 Amas vin kaj Dio Fojbo,
 Dolĉan kanton al vi donis.
 Maljuneco vin neniam
 Forkonsumos, kantamisto;
 Saĝa elternaskiĝinta,
 Sensufera kaj dotita
 Per sensanga korpo, preskaŭ
 Al la Dioj vi similas.

19.

La nigra tero trinkas,
 La arboj trinkas teron,
 La maro ankaŭ trinkas
 Vice la riveretojn.
 La suno maron trinkas,
 La luno ja la sunon.
 Kial do vi malpacas
 Kun mi, Ho kamaradoj,
 Ankaŭ volanta trinki?

59.

Plektante girlandetojn
 Mi trovis iam tie
 La Amon en la rozoj;
 Prenante per flugiloj
 Mi trempis lin en vinon;
 Kaj trinkis mi la vinon,
 Kaj nun en mia korpo
 Liaj tiklas flugiloj.



LA VERDA "KANGARUO" AŬ DIDELFO

Originala verko de Wren J. Grinstead, Richmond, Ky.

De Lunvir' estas mi fianĉino,
En juni' mi fariĝos edzino.
Post nigra nub' iu
(Postenvenu, veniu!)
De Lunvir' estos mi amatino!

Tiel ludis la fonografo apud la strato. Estis nur kelke da tempo antaŭ la temanĝo; kaj Ĉikorio, sidante sur la ŝtupo, aŭskultadis. Ŝi rigardis supren al la granda ronda plenluno, kaj ekmemoris ĉion, kion ŝi iam aŭdis pri ĝi, kaj tre miris je ĉio pri ĝi:—ĉu ĝi efektive estis farita el verda fromaĝo, kaj kio ĝin igis tiel flava, kaj kion havis la Lunviro por trinki, kaj ĉu li ŝatis la malvarman pizsupon, per kiu li jam brulumis la buŝon.

Subite ekvokis ŝia patrino: "Ĉikorio, kuru al la butiketo ĉe la stratangulo, kaj aĉetu pro tripencoj da verda fromaĝo por la temanĝo. Jen ŝilingo sur la tablo. Ne perdu la restaĵon."

Ĉikorio pripensis dum minuto, kaj tiam levis sin malrapide, kaj prenis la ŝilingon, ripetante al si mem: "*Pro tripencoj da verda fromaĝo por la temanĝo. Jen ŝilingo sur la tablo. Ne perdu la restaĵon!*" Ŝi parolis ĝin trifoje au kvarfoje antaŭ ol ŝi alvenis al la pordego, sed iel tio ne ŝajnis esti tute prava, ŝi do provis ĝin alimaniere:

"*Pro tri pencoj da verda teo por la fromaĝomanĝo. Jen la restaĵo sur la tablo. Ne perdu la ŝilingon.*" "Ne," ŝi diris, "mi pensas, ke eĉ tio estas prava. Mi kredas, ke ĝi estas malprava iel pri la ŝilingo. '*Pro tri pencoj da verda fromaĝo por la temanĝo. Jen tablo sur la ŝilingo. Ne perdu la restaĵon.*' Mi opinias, ke tio estas prava," ŝi diris, kaj marŝis pli rapide, rigardante supren al la plena luno, kiu ŝajnis esti grandiganta kaj heliganta kaj proksimiganta.

Tiam ŝi pensis: "Mi tamen neniam aŭdis pri ŝilingo, kiu havis tablon sur si. Mi miras ĉu ĝi vere havas! Mi rigardos ĝin." Sed ŝi ne rigardis tuj, ĉar estis tiel mallume, ke ŝi eble ne povus trovi la ŝilingon, se ŝi okaze perdus ĝin. Ŝi do nur iris rekte antaŭen, kaj eĉ pli atentis la plenan lunon, kiu jam estis tiel granda, ke ĝi kovris la duonon de l' ĉielo, dum ĝia rando sin kaŝis post la monteto. Ŝajnis al Ĉikorio ke ĝi estis torto mordetita de musoj.

Ĉikorio estis ja neniam irinta preter tiu monteto, kaj ŝi estis preskaŭ tiom mirinta pri tio, kio estus tie, kiom ŝi nun miris pri la luno. Tial ŝi diris al si mem, ke nun oportune estas, dum tiel proksima estas la luno, ke ŝi vidu la alian flankon de la monteto, kaj eble ekiru en la lunon kaj vidu ankaŭ, kiel ĝi ŝajnas. Certe, jen ŝia komisioto; se tamen la luno efektive estis farita el verda fromaĝo, kial ŝi ne povos tie aĉeti iom kaj ĝin porti hejmen por la temanĝo, anstataŭ devi elspezi sian ŝilingon ĉe la butiketo? Ŝajnis tre bona ideo, kaj Ĉikorio iris rekte antaŭen al la luno.

Kiam ŝi atingis la supron de l' monteto, ŝi vidis ke la tero ŝanĝiĝis en lunaĵon tute proksime. Estis ja tiel, kiel ŝi antaŭe pensis. Ŝi iris malsupren al la bordo. Ŝi iom timetis iri trans tiun ĉi linion, ĉar ŝi ne sciis, ĉu la luno eble estas tuj flugonta en la ĉielon. Ŝi do faris al ĝi puŝeton per la piedpinto, kaj, ĉar ĝi ŝajnis sufiĉe firma, ŝi saltetis, kaj kuris iom, kaj trovis sin fine en la luno.

Ŝajnis tre strange. La ĉielo estis mallumeta, kaj la steloj similis rondajn truetojn en granda blua kurteno, kun seba kandelo elstaranta tra ĉiu trueto. Sed la luntero estis tre brila, tute simile al nova ŝilingo, kaj ŝi povis tre bone vidi la vojon.

Tuj kiam ŝi kutimis al la vido de l' mallumo supre kaj la brilo sube, ŝi okaze repensis pri la ŝilingo, kaj komencis miri pli ol iam, ĉu ĝi vere havas tablon sur si. Certe ŝi ne povus nun perdi ĝin, ŝi do eltiris ĝin el la poŝo, kaj tenadis ĝin rekte antaŭ la okuloj, kiam ĝi faris grandan saltegon—supren el la mano kaj tra la aero—kaj, kiam ĝi revenis al tero, ĉirkaŭ dudek futojn antaŭ ŝi, ĝi havis ja ŝilingon kiel kapo, sed ĝia korp'o estis tia, kia de plenkreskita "kangaruo," arĝent-blanka kolore; kaj ĝi, kiel eble plej ĝentile, salutadis kaj ridetadis.

Ĉikorio unue iom timetis, kaj tre klinis sin trifoje aŭ kvarfoje. Sed la Ŝilingo—au la "Kangaruo"—parolis unue, kaj diris:

"Ni tre ĝojas, vin vidante en la luno, Ĉikorio. Kion mi povas por vi fari?"

Ĉikorio ne tiel timis nun, sed ŝi iom hontetis, kaj komencis:

"Se plaĉas al vi, Sinjoro Ŝilingo, mi—"

Sed la Ŝilingo ŝajnis tiel ekmiri pri tiu ĉi parolo, ke Ĉikorio subite ĉesis. Tiam li diris:

“Mi *petas* vian pardonon, sed kiel vi min nomis?”

Ĉikorio denove ektimis, kaj diris per kiel eble plej malforta voĉo:

“Mi ne intencis ion malbonan, Sinjoro. Vi ja estis iam ŝilingo, kaj mi pensis, ke tio estas certe via nomo.”

“Pu!” diris la Ŝilingo. “*Iam* estis ŝilingo? Nu, mi estas ja *nun* ŝilingo. Kaj mi estas ankaŭ “kangaruo.” Sed tio nenion signifas. Via patro estas homo, sed vi ne nomadas lin Sinjoro Homo, ĉu ne?”

Certe Ĉikorio tiel ne faris. Sipripensis dum minuto, kaj tiam ŝi diris:

“Sed kio estas do via nomo, Sinjoro?”

“Tio ne estas la afero,” diris la Kangaruo. “La afero estas, ‘Kiel vi devas min nomi.’”

“Nu, kiel do mi devus vin nomi?—mi *petas*,” diris Ĉikorio.

“Pli bona ja tio,” diris la Kangaruo. “Diversaj homoj min diverse nomadas. La Lunviro min nomadas per mia patronomo, sed li ne ŝatas, ke iu alia min tiel nomas. Mia baptonomo estas Roberto; mi do pensas, ke mi volas, ke vi nomu min Onklo Bob.”

Ĉikorio klinis sin denove, kaj rekomencis:

“Mi *petas*, Onklo Bob—”

La Kangaruo klinis la kapon, kaj diris:

“Eĉ pli bone! Mi vidas ke vi estas bonspeca knabino, Ĉikorio, nun, kion mi povas fari por vi?”

“Mia patrino min sendis por iom da verda fromaĝo,” diris Ĉikorio. “Ĉu vi povas diri al mi, ĉu mi iom trovos tie ĉi en la luno?”

La “Kangaruo” ŝajnis tre dubsenta, kaj skuis la kapon. “Verda fromaĝo?” li diris. “Ne scias, certe. Ĉu ni iros por demandi ĉe la Lunviro?”

Ĉikorio saltetis kaj kunfrapis la manojn. “Ho, tiel ni faru!” ŝi ekkriis. “Mi tiel ŝatus vidi la Lunviron! Mi tiom aŭdis pri li! Mi volas al li demandi, kion li havas por trinki, kaj ĉu li ŝatis la malvarman pizsupon, per kiu li jam brulumis la buŝon.”

La “Kangaruo” malgaje rigardis ŝin kaj tusetis. “Eble vi devas zorgi pri tio, kion vi demandas al li, kaj eble vi devas ne tro demandi,” li diris. “Li estas iom kolerema, kiam la reŭmatismo doloras. Kaj pri lia trinkaĵo, tion mi mem povas montri al vi. Ne estas necese, ke ni lin enuigu pri ĝi.”

“Mi tamen tre deziras demandi al li tian amason da aferoj!” Ĉikorio petegis. “Ĉu mi diros ilin ĉiujn al vi, kiam ajn mi pensos pri ili? Kaj vi tiam povos diri al mi, ĉu mi kuraĝos ilin demandi al li!”

“Eble pli bone estus,” diris la “Kangaruo.” “Mi konas lin bone.”

“Mi aŭdis tre amuzan kanton pri il hodiaŭ vespere,” diris Ĉikorio. “La fonografo de Sinjoro Jenkinson kantis ĝin.”

La Kangaruo ruĝiĝis kaj diris:

“Jes, Fono kantadas ĉiam. Ŝi estas tre bona kantisto, estas Fono.”

“Fono?” diris Ĉikorio malrapide. “Mi ne sciis—ĉu estas *tio* ĝia nomo?”

“Ĝi estas *ŝia* nomo,” diris la Kangaruo rigide, “kompreneble. Fono—tiel vi mem ŝin ĵus nomis—Fono Grafo.”

“Ho-o!” diris Ĉikorio. “Mi vidas. Jes, mi pensas, ke ŝi estas tre bona kantisto. Mi povas ŝin aŭskulti dum horoj.”

“Kion ŝi kantis hodiaŭ?” diris la “Kangaruo.”

“Tio kuris tiel,” diris Ĉikorio, kaj komencis kanti:

“De Lunvir’ estas mi fianĉi-i-ino!”

Sed tuj kiam ŝi finis la unuan linion, la “Kangaruo” terurege timigis ŝin per krio, kiu similis “Vikeriĉombovligeramomski!” saltegante samtempe ĉirkaŭ dekkvar futojn rekte supren en la aero. Kiam li revenis al tero (kiel li ne faris dum du aŭ tri minutoj), lia vizaĝo estis tiel ruĝa kiel ia beto, kiun Ĉikorio iam vidis; kaj li mordadis sian langon dum kelke da minutoj antaŭ ol li povis paroli. Tiam li diris:

“La restaĵon.”

“Mi—mi forgesis la restaĵon de tiu strofo,” diris Ĉikorio, “esceptinte ke ŝi diris, ke la edziĝo okazos iam en Junio. Sed estis alia strofo, kiu kuras tiel:

“Aerŝipe suprenironte,

La lunan finanĉon vidonte.

Ĝojigus vere min

Unufoje kisi lin—

Mi raviĝus, kisojn dekdu dononte.”

(daŭregota)



MALRICULAJ OKULOJ

(El "Petits Poèmes en Prose" de Beaudelaire.)

Ah! vi volas scii kial hodiaŭ mi malamas vin. Estos al vi sendube malpli facila ĝin kompreni, ol al mi ĝin klarigi al vi; ĉar vi estas, mi kredas, la plej bela ekzemplo de virina sentenco, kiun oni povas renkonti.

Ni estis kune pasigintaj longan tagon, kiu al mi ŝajnis mallonga. Ni estis promesintaj al ni, ke ĉiuj pensoj niaj estos reciproke komunaj, kaj ke niaj animoj fariĝos estonte unu sola; —revo, kiu estas neniel originala, tamen, se ne pro la fakto ke, kvankam revita de ĉiuj homoj, ĝi efektiviĝis al neniu.

La vesperon, iomete laca, vi volis sidiĝi antaŭ nova kafejo, kiu formis la angulon de nova bulvarado, ankoraŭ plena je rubo, kaj montranta jam grandioze siajn belecojn neplenumitajn. La kafejo brilegis. La gazo mem montris la fervoron de komenco, kaj lumigis per ĉiu forto sia la murojn blindige blankajn, la tablotukojn, la spegulojn, la oron de la vergoj kaj kornicoj, la paĝojn ruĝvangajn trenatajn de la hundoj kunligitaj, la sinjorinon ridantan al la falko staranta sur ilia mano, la nimfojn kaj diinojn portantajn sur ilia kapo fruktojn pasteĉojn kaj ĉasaĵojn, la Hebeojn kaj la Ganimedojn prezentantaj per elmetitaj brakoj la amforeton da trinkaĵo aŭ la dukoloran obeliskon el glaciaĵo, —tuta la historio kaj la mitologio metitaj al la servado de la plezuro de manĝado kaj trinkado.

Jus antaŭ ni, sur la trotuaro, staris bravulo ĉirkaŭ kvardek-jara, kun vizaĝo laca, tenanta per unu mano knabeton kaj portanta per la

alia brako kreaĵeton tro malfortikan por marŝi. Li plenumis la oficon de flegistino, kaj igis siajn infanojn preni la vesperan aeron. Ĉiuj estis ĉifone vestitaj. Tiuj tri vizaĝoj estis eksterordinare seriozaj, kaj tiuj ses okuloj fikse rigardadis la novan kafejon kun admiro egala, sed nuancita diverse de la aĝo.

La okuloj de la patro diris: "Kiel bela! Kiel bela! oni dirus, ke tuta la oro el la kompata mondo venis por sin meti sur la murojn." La okuloj de la knabeto: "Kiel bela! Kiel bela! sed estas domo kiun povas eniri nur tiuj, kiuj ne estas kiel ni." Koncerne la okuloj de la plej malgranda, tiuj ĉi estis tro sorĉataj por esprimi ion alian ol ĝojon stupidan kaj profundan.

La kantetistoj diras, ke la plezuro bonigas la animon kaj dolĉigas la koron. La kanto pravis tiun vesperon, rilate al mi. Ne nur mi kortuŝiĝis pro tiu familio el okuloj, sed mi ekhontiĝis iomete pro niaj glasoj kaj karafoj, pli grandaj ol nia soifo. Mi turnigis miajn rigardojn al la viaj, kara amo, por tie legi mian penson; mi profundigis en viajn okulojn tiel belajn kaj tiel strange dolĉajn, en viajn okulojn, kie loĝas la Kaprico, kaj kiujn inspiras la Luno, kiam vi diris al mi: "Mi ne povas toleri tiujn friponulojn kun iliaj okuloj malfermitaj kiel pordegoj! Ĉu vi ne povus peti la kafejestron, ke li malproksimigu ilin de tie ĉi?"

Tiom estas malfacila la interkompreno reciproka, kara anĝelo, kaj tiom estas nekomunikbla la penso, eĉ inter geamantoj!

Tradukis, Arthur Gray, London, G. B.

BOOK REVIEW

Tra la Esperanta Literaturo. This little book contains fifty selections from the best Esperanto literature. The selections are on the average about two pages in length. They will therefore be very useful for *class* work. We recommend the book highly for this purpose, especially for those classes which do not feel that they can use the *Krestomat*io. The book can be obtained directly from Prof. Luigi Giambene (Secretary of the Imperiosa Civitas—the Roman Esperanto Society), 198 Babuino, Rome, Italy, or from the British Esperanto Society. Price, 30 cents in U. S. postage stamps.

Esperanta-Germana Frazlibro de la Ĉiutaga vivo, laŭ R. Anton, prilaboris J. Borel. This is a book of conversations about every-day subjects: *Vetero*, *Sur la Strato*, *En Magazeno*, *En la Hotelo*, *Ĉe la Fervojo*. It contains about sixty pages, printed in parallel columns, one column German and the other Esperanto. The phrases are simple, short, and practical, and the Esperanto text good. This book will be very useful to those who wish to get a speaking knowledge of the language. Even those who know no German can derive much advantage from this book. *A person with the slightest knowledge of Esperanto can guess the meaning*

of its simple phrases. Price, 20 cents in U. S. postage stamps: Esperanto-Verlag Möller & Borel, 95 Prinzenstrasse, Berlin, S., Germany. many.

Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch, redigiert von Dr. L. L. Zamenhof. The Deutsch-Esperanto part of this book contains about 3,500 German words; the Esperanto-Deutsch portion is essentially the *Universala Vortaro*. The book will be useful to American citizens of German birth; although not as complete as the larger dictionaries, it contains nearly everything needful for ordinary purposes. The print and paper are both good, and it sells at the ridiculously low price of 36 cents, U. S. postage stamps. Address Esperanto-Verlag Möller & Borel, 95 Prinzenstrasse, Berlin, S., Germany.

Sinjoro Vento kaj Sinjorino Pluvo, de Paul de Musset, tradukita de Paul Champion,—120 pages. This is a charming story of the fairy kind. It is well printed and contains twenty or thirty small illustrations. It is well adapted for the purpose of a first reader in Esperanto, particularly for classes of boys and girls. Send it as a Christmas present to some of your younger friends. If they are unacquainted with Esperanto, send Bullen's Lessons with it. The price of the book is 35 cents, U. S. postage stamps. Address Presa Esperantista Societo, 33 rue Lacépède, Paris, France.

Libreto pri Transmorta Vivo, de Gustav-Theodor Fechner, tradukita el la lingvo germana de P. Kadik,—70 pages. This is a translation of a semi-philosophical, semi-scientific essay of a well known German psychologist. The subject is interesting, and it has been treated in an interesting, non-technical manner. The Esperanto translation is good. We recommend this book especially to students and clergymen. Price, 25 cents, U. S. postage stamps.

Address Presa Esperantista Societo, 33 rue Lacépède, Paris, France.

Kelkaj Floroj Esperantaj. This little book contains 20 pages of jokes, stories, etc., illustrated by a score of illustrations. It might be made to serve a very useful purpose in enlivening the monotony of an ordinary class-lesson. Price, 10 cents U. S. postage stamps; three copies for 25 cents. Address A. J. Witteryck, 4 Nouvelle Promenade, Bruges, Belgium.

"Keys." We suppose that every Esperantist is acquainted with the little "keys" (*ŝlosiloj*, tiny dictionaries), which have already appeared in the following languages: English, German, Swedish, Dano-Norwegian, French, Spanish, and Italian. Three other languages have been added to the list: *Russian*, *Hungarian*, and *Portuguese*. These have been gotten up in the same good style as those which have already appeared. The price of the "keys" in any language is 75 cents a hundred; smaller lots at proportional prices. You can also get an assorted lot of a hundred at 75 cents. We should advise all clubs to get at least a hundred such immediately. Address Internacia Propagandejo Esperantista, Merton Abbey, London, S. W., England. (The English, German and Spanish "keys" can also be obtained from the American Esperanto Association, 5 for 10 cents.)

Bunch of Keys. La *Universala Ŝlosilaro*. This little book, *neatly bound in "leatherette,"* contains "keys" in seven languages. Price, 25 cents. Address The Internacia Propagandejo Esperantista (see above).

For those who have finished Bullen's Lessons, there is a good, little book called **Lawrence's First Reader**. It contains selections of Esperanto, prose and verse, several of which are accompanied by English translations. (Price, 26 cents, American Esperanto Association.)

KORESPONDADA FAKO

Blois, Loir-et-Cher (France). Sro. Raoul Oury deziras korespondadi kun fremduloj, letere pri Esperanto kaj aliaj temoj, poŝtkarte pri vidaĵoj.

Tokio (Japan). Sro. Oshio Tachibana, I Hinoki Cho, Agasaka, deziras korespondi kun alilandanoj.

Sagaken (Japan). Sro. Sakuichi Senju, 26, Hyogo Mura Saga Gun, deziras korespondi kun alilandanoj.

Enisejk (Siberia). Sro. Romano Frenkel, inspektoro de gimnazio intencas eldoni "Esperantan Krestomation por la Infanoj." Tial li petas ĉiujn esperantistojn sendi al li tradukojn en Esperanto el iliaj naciaj krestomatiaj.

Boulogne-sur-mer (France). Sro. Maurice Guibon, 38 rue Nationale, deziras interŝangi poŝtmarkojn kun ĉiuj kolektantoj.

Bulgaria. La jenaj samideanoj bulgaraj deziras korespondadi kun fremduloj:

Jvan Terekiev, Tirново.

Ja. Jankov, Tirново.

R. Avramov, vilaĝo Arbanasi, Gornja Orehovica.

St. Kojčev (manifakturaĵisto), Tirново.

V. Venkov (komercisto de manifakturaĵoj), Tirново.

Fraŭlino M. Abadžieva, kv. "St. Atanas," Tirново.

Fraŭlino Vesela Nenkova, st. Sv. gorska, Tirново.

N. Dimitrov, vilaĝo Prisovo, Tirново.

Georgi Kamakov (banka oficisto), Tirново.

Fraŭlino Zlata Jlieva, kv. "Sv. Konstantin," Tirново.

Fraŭlino Paraskeva D. Kovačeva (instruistino), st. Rezervuarska No. 1352, Tirново.

D. Nojev (oficisto en la garo), Tirново.

Georgi D. Kovačev (oficisto en la garo), Tirново.

Ĥr. Dimov (oficisto), akcizno upravlenie, Tirново.

S. Pljasov (oficisto), akcizno upravlenie, Tirnova.

Vasil Dosev (manifakturaĵisto), Tirново.

Hanoi, Tonkin (Indo-China). Sro. J. Laurent, farmacisto helpa-majora de la trupoj koloniaj, deziras korespondadi kun geesperantistoj letere aŭ poŝtkarte.

Auby-lez-Douai, Nord (France). Sro. E. Philippe (19 jara) deziras korespondadi pri pacifismo, propagando, literaturo, kaj interesanĝi ilustritajn poŝtkartojn.

Bona rimedo por ricevi la adresojn de personoj dezirantaj korespondantojn estas sendi letereton petantan tiujn ĉi al sekretario de loka Esperantista Societo. La nomojn de iuj lokaj fremdaj societoj oni povas trovi en la ĵus eldonita Jarlibro (Hachette & Cie., 79 Boulevard St. Germain, Paris, prezo kun poŝtpago 4 fr.

aŭ \$0.80). La nomoj de la lokaj Amerikaj societoj troviĝas sur la dua paĝo de la kovrilo de la Amerika Esperanto Jurnalo. Ne forgesu sendi poŝtmarkojn por respondo: sendu almenaŭ dek cendojn, (50 centimoj francaj) al fremdaj societoj, ĉar oni ne tie ricevas poŝtmarkojn je ilia plena valoro.

KRONIKETO

In **Mexico City** are two Esperanto clubs. One is presided over by Sno. Ramon Mantelona, teacher of Pedagogy in the Normal School. It meets regularly at the Normal School, Santa Teresa Street. Another, called "Zamenhof Academy," has for president Professor Luis G. Leon, teacher of physics at the National Preparatory School, author of several books on Esperanto. Professor Leon has delivered four lectures on Esperanto before the Astronomical Society of Mexico, and other lectures in Coyocan, a suburb of the capital city.

Toward the end of the school year an Esperanto club was formed in the **University of Pennsylvania**. The president is Mr. Seabury C. Gilfillon, and the secretary, Mr. J. P. Clark. Prof. Grillon, the active propagandist, is instructor. We wish the club success. May it rival that of the University of Chicago!

A short notice of Esperanto appeared in the July number of "**The American Boy**" under the section entitled "Keeping Tabs With the World." As a consequence, some hundreds of boys, all over the country, have written to us for information and text books. They will

give to their teachers some interesting moments when school re-opens in the fall.

We have received information of the formation of an Esperanto class in **Everett**, Washington, with Mr. Frank P. Zent as instructor. Other clubs recently formed and affiliated with the American Esperanto Association are the "**Indianapolis Esperanto Society**," Secretary, Miss Mary McEvoy, 21 E. Ohio street; "**Washington Esperanto Society**," Secretary, Mr. Charles W. Stewart, 1211 Kenyon street, N. W., Washington, D. C., and "**Non Nobis Solum Esperanto Club**," Secretary, Miss Sadie Rucker, 1205 Chandler ave., Evansville, Ill.

In several summer vacation camps the study of Esperanto forms part of the daily program. For example, at **Camp Becket (Y. M. C. A.) in Western Massachusetts**, a class of twenty young men, under the guidance of Mr. Harry Messenger, devotes an hour each evening to study and conversation. A number are already enrolled in the "Adresaro," and others are aiming at the American "Atesto pri Kapa-bleco."

ESPERANTISMO

Ario: Misiista Himno.

The musical score is written in 2/2 time and consists of three systems. Each system has a vocal line on a treble clef staff and a piano accompaniment on a bass clef staff. The key signature has one flat (B-flat). The first system shows the beginning of the piece. The second system includes a vocal line with the lyrics 'ei' written above it. The third system concludes the piece with a double bar line.

Angelo iras super la kara nia ter'
 Kaj la flugiloj liaj ĝin benas je esper'.
 Sur mondon venas paco, la paco de l'ĉiel',
 El ĉiu kolomb-plumo de tiu-ĉi anĝel'.

Altenas li la stelon de la radioj kvin
 Kun kiu homoj venkos kaj multpovigos sin.
 Kunligas li naciojn per granda lum-ruband'.
 Tra l'mondo kiel kuras la bona propagand'.

La ĝenan lingvan nubon li forte tenos for
 Dum suno daŭras brili, dum bati povas kor'.
 Science, amikece, ligiĝas lia rond',
 La lando lia estas la tuta homa mond'.

—Thomas Hunter, A. E., 102.

Esperanto songs, whether sung to well-known airs or set to new music, may often be of great use at meetings arranged to attract the public. Furthermore, they serve the purpose of enlivening class meetings and club gatherings. *Best of all they help students to gain confidence and to pronounce the vowels in a full open manner.* We therefore advise local societies to get a stock of such songs. They can be procured from the British Esperanto Association, 13 Arundel St., Strand, London. W. C. (This association sells a little book of six songs called *Kvarvoĉaj Kantoj* for 20 cents.) La Librairie de Esperanto, 15 rue Montmartre, Paris, has a *special price-list* of

pieces of music, songs, plays, etc. The American Esperanto Association will send the price-list of either of these firms for 3 cents in postage stamps.

We advise all persons who wish to set Esperanto songs to music to be sure to select *good* Esperanto poems. All those found in the *Krestomatio* and the *Kondukanto* can be considered good; those that are found elsewhere must be considered each one separately upon its own merits. "Mi aŭdas vin," the work of Dro. Leono Zamenhof, is good Esperanto verse, and has been set to music by our "samideano" Sro. Herbert Harris, of Portland, Me. *Price, 35 cents, American Esperanto Association.* Help our "afero" by having a copy or two.

International Reviews printed *only* in Esperanto

<i>Internacia Scienca Revuo</i> (International Scientific Review) Price Sm 2,75 = \$1.40 8 rue Bovy-Lysberg, Geneva, Switzerland.	\$1.40
<i>La Revuo</i> —literary monthly—Dr. Zamenhof, Chief Collaborator. Hachette et Cie., 79 Boulevard St. Germain, Paris, France.	\$1.40
<i>Tra la Mondo</i> —illustrated monthly. “Gazeto Tra la Mondo,” Meudon (S. et O.), France.	\$1.60
<i>Lingvo Internacia</i> —twice a month—with 300 pages of literary supplement annually. \$1.50 “Presa Esperantista Societo,” 33 rue Lacépède, Paris (V ^e), France.	\$1.50
<i>Juna Esperantisto</i> (same address)	\$0.50
<i>Espero Pacifista</i> —International Peace Magazine Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly sur Seine, France.	\$1.00
<i>Espero Katolika</i> —Roman Catholic Monthly Abbé Em. Peltier, Ste. Radegonde près Tours (L. et L.), France.	\$1.00
<i>Internacia Socia Revuo</i> R. Louis, 45 rue de Saintonge, Paris, France.	\$1.20
<i>Esperanto Ligilo</i> —printed in “relief” for the Blind. Th. Cart, 12 rue Soufflot, Paris, France.	\$0.75

Sample copies of the above mentioned Journals cost one-tenth the year's subscription. Send U. S. postage stamps for sample copies, and *U. S. Postal Orders* for subscriptions. Use the following form for subscriptions:—

Estimata sinjoro,

Mi deziras aboni la (journal) de la unua de
. (month). Mi sendas poŝtmandaton je \$ por la abono.

(Name)

(Address)

Esperanto: Auxiliary International Language

300 ORGANIZED SOCIETIES—20 JOURNALS

Supported and endorsed by many prominent men in Europe, Asia and America. London Chamber of Commerce holds regular Esperanto examinations.

For general information, for addresses of Esperanto magazines (British, French, German, Russian, Japanese, Polish, Swedish, etc.) and societies, for books, etc., write to the

AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION

BOULEVARD STATION, BOSTON, MASS., U. S. A.

Bullen's Lessons	\$0.26
Descriptive booklet, pamphlets, etc.10
Krestomatia (standard for style), paper	1.00
“ “ “ cloth	1.50

American Esperanto Journal, sample copy10

Send for price-list; all profits are spent for the advancement of the Esperanto “cause.”

Send two-cent postage stamp for catalogues of the British Esperanto Association and of the Librairie de l'Esperanto (Paris). These are much more complete than that of the American Esperanto Association.

TO STUDY ESPERANTO

THE "STANDARD SERIES" OF BEST HELPS AT LOWEST COST

EVERYTHING necessary to begin the fascinating study of the universal language. Indeed, the *Students' Complete Text Book* (50c.) alone will make one an enthusiastic Esperantist at an amazingly small expense of time and study. All of the following sent postpaid upon receipt of price.

Esperanto Students' Complete Text Book.—
Containing full grammar, exercises, conversations, commercial letters and two vocabularies. 16mo, cloth, Net, .50

English-Esperanto Dictionary. By J. C. O'Connor and C. F. Hayes. Boards, Net, .60

Esperanto-English Dictionary. By A. Motteau. Boards, Net, .60

A First Reader. Compiled by E. A. Lawrence. Intended for those beginning the study of Esperanto. Net, .25

Lessons in Esperanto. Compiled by Geo. W. Bullen. Paper covers. Net, .25

A Primer of Esperanto. Net, .10

Christmas-Carol. Paper Net, .40

Handy Pocket Vocabulary. Compiled by J. C. O'Connor, B. A. Paper, Net, .10

The Whole of Esperanto and the means of learning it without lessons by reading a little story. Paper binding, postpaid, Net, .05

SEND FOR CIRCULARS

FLEMING H. REVELL COMPANY, Publishers

NEW YORK: 158 Fifth Avenue

CHICAGO: 80 Wabash Avenue

"MI AUDAS VIN"

La unua kanto Esperanta eldonita en la U. Ŝ.;
muziko de Sro. Herbert Harris; poemo de Dro.
Leono Zamenhof. Facila por meza voĉo.—

PREZO: FR. 1.75 (35 CENTS);

5 EKZEMPLEROJ, FR. 7.50 (\$1.50)

American Esperanto Association

Boulevard Station, Boston, Mass., U. S. A.